


LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono K 12.— (por 10 numeroj). — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. —
Administrejo: Fr. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Poŝta ŝparkaso
no. 169.352. — Telefono: 732./VI. — La manuskriptojn oni ne resendadas.

Speciala eldono
dediĉita al la sepdeka naskiĝdato de prezidanto Masaryk.



T. G. MASARYK,
PREZIDANTO DE ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO.

T. G. MASARYK.

La 7. marton t. j. festas la Bohemoj kaj Slovakoj la sepdekan naskiĝdaton de sia plej granda nacia heroo, kreinto de nova bohema memstareco kaj konstruinto de Ĉeĥoslovaka respubliko. Ili festas la naskiĝdaton de sia „paĉjo Masaryk“, de tiu sentima batalanto de la Vero, kiu en sia sesdek-kvina jaro komencis ĉirkaŭveturi la terglobo, por atentigi la demokratran mondon, ke tie en la mezo de l'Europo estas sufokata nacio kun glora pasinteco, kiu vane dum centjaroj batalas por siaj malnovaj rajtoj, kiu per malliberejo kaj ekzekutado estas devigata batali por siaj subpremantoj.

Kiam li en la fino de la jaro 1914. forkuris trans la aŭstria landlimoj, neniu en lia patrujo supozis, kiel alta estas lia celo. Li malaperis kaj lia nomo reaperadis, estante surverŝata per kalumnioj de tiuj, kiuj estris en Aŭstrio. Kun korpreno kaj esperoj komencis la bohema nacio sekvi lian agadon, kiam venadis necertaj sciigoj pri lia ĉeesto jen en Parizo aŭ Londono, jen en Curiĥo kaj Genevo, en Petrogrado kaj Moskvo, eĉ en Vaŝingtono kaj Ĉikago. Venis sciigoj pri lia formado de ĉeĥoslovakaj legioj en Rusio, en Francio eĉ en Italio kaj Ameriko, kaj antaŭ la bohema popolo komencis aperadi la silueto de tiu giganta konstruaĵo, kiun Masaryk komencis konstrui. Kaj jen la bohema nacio komencis kredi, ke proksimiĝas la momento de ĝia liberiĝo . . .

Li foriris kiel proskripciulo, la 25. marton 1916 eksigis lin la aŭstria registaro el la bohema nacio, altrudinte al la bohemaj gazetoj deklaron, ke la bohema nacio havas kun li nenion komuna kaj ke li perdis la rajton nomi sin filo de bohema nacio. Kaj nun en la libera respubliko aŭdiĝas ĝojaj „vivu!“ krioj ĉe ĉiu publika elparolo de lia nomo.

T. G. Masaryk estas geniulo kaj heroo. Ĉu lia nacio komprenas kiun gvidanton ĝi havas?

* * *

Masaryk naskiĝis en la jaro 1850. en la moravia urbo Hodonín*). Lia patro estis kuĉero de imperiestra bieno. La infanaĝo de Tomaso estis tre scenoriĉa, ĉar liaj gepatroj vivis preskaŭ ĉiun duan jaron en alia vilaĝo. Lia patro devenas el Kopčany en Slovakio, tiam hungara, kaj lia patrino el iom german-

*) La biografion de Masaryk ni ĉerpis el la angla traduko de la verko de Dr. Jan Herben: „Thomas G. Masaryk“.

igita familio en Hustopeč, urbeto sur morava plataĵo. Hejme Tomaso ellernis la lingvon boheman kaj iom la germanan kaj venis en boheman lernejon en Ĉejkovic. Laŭ rekomendo de sia instruisto li estis sendita en malaltan „realan lernejon“ en Hustopeč (germana certe, ĉar bohemlingvaj mezaj lernejoj tiam en Moravio ne ekzistis). Tie li absolvis la unuan kaj duan klasojn, kiuj estis necesaj por eblegi la akcepton en la instruista pedagogia instituto. Tomaso estis fariĝonta instruisto. Sed kiam li estis absolvinta la duan klasojn de la „reala lernejo“ li estis dekretita jara kaj en la pedagogia instituto oni ne akceptadis knabojn malpli ol dek-ses jaraj. Tie li fariĝis instruista praktikanto en la lernejo de Hodonín, kie li instruis ankaŭ muzikon. Sed al liaj gepatroj ne plaĉis la longa atendo kaj tial ili elektis por li metion. La patrino forkondukis lin en Vienon al unu familio, kie ŝi iam servis kaj kiu havis seruristan laborejon. Sed Tomaso tie longe ne restis, ĉar enuis lin stari senĉese ĉe maŝino fabrikanta hufoferojn kaj ĉar aliaj lernantoj ŝtelis al li iliajn librojn. Li revenis al siaj gepatroj en Ĉejĉ kaj tie li eklernis alian metion. Li volis esti forĝisto. Tamen. post admonoj de sia iama instruisto, la gepatroj decidiĝis, ke li ŝu preparu por la rolo instruista. Tomaso denove fariĝis praktikanto de la lernejo en Ĉejkovic. Da instruado ne estis multe, ĉar la lernejo vizitadis nur tiu, kiu mem volis (la lernejo vizitado ne estis deviga). La instruista praktikanto gvidis enterigojn, kantis ĉe ili kaj prizorgis la ŝonoradon, kaj ĉar li estis sciavida, li lernis la lingvon francan. Kiam finiĝis la lerneja jaro 1865, laŭ iniciativo de la loka kapelano, Tomaso faris ekzamenon por la dua gimnazia klaso kaj komencis studi en Brno.

Kvankam Masaryk prizorgis en Brno siajn vivrimedojn per privata instruado, li tamen studis en la gimnazio (kompreble germanan) kun tre bona rezultato. Per privata studo li eĉ la polan lingvon ellernis tiom, ke li skribadis siajn lecionojn ankaŭ pole. Post absolve de la sesa gimnazia klaso li translokiĝis en Vienon. Tie li finis la gimnaziajn studojn kiel premiito kaj krom tio li sciis jam eĉ la rusan lingvon tiom, ke en rusa familio li instruadis infanojn. En Vieno li studis ankaŭ la universitaton, tie li ricevis la doktoran diplomon kaj tie li fariĝis ankaŭ docento de filozofio. Dum tiu tempo li travivis unu jaron en Leipzig, kie li konatiĝis kun fraŭlino Charlie

Garrigue, kun kiu li edziĝis en Ameriko en la jaro 1878. Post kiam la universitato en Praha estis en jaro 1882. dividita je parto bohema kaj germana, Masaryk fariĝis profesoro de la unua.

Tia estis vivhistorio de la viro, kiu en la jaro 1882. komencis labori en la universitato de Praha kiel instruisto kaj organizanto de siaj pli junaj kolegoj, kiujn li kunigis en la scienca gazeto „Athenaeum“.

* * *

Tomáš Garrigue Masaryk edukis kelkajn generaciojn, kiuj alterniĝis en liaj universitataj paroladoj. Li verkis vicon da rimarkindaj verkoj, kaj vigle partoprenis la politikan kaj publicistan vivon. El liaj verkoj ni citas: Pri hipnotismo, verko psikologia (1880). La memmortigo kiel ĝenerala fenomeno de la moderna civilizacio (germ. en 1881). Kvanto de versimileco kaj skeptikeco de Hume (1883). Blaise Pascal, lia vivo kaj filozofio (1883). Teorio de la historio laŭ principoj de T. H. Buckle (1884). Pri studo de verkoj poetaj (1884). Fundamentoj de konkreta logikeco (1885). Slavaj studoj (1889). La bohema demando kaj Nia nuna krizo (1895). Karel Havlíček (1896). La Sociala demando (1898). Monogamio kaj poligamio (1899). Johano Hus (1899). Pri la neceseco revidigi la proceson de Polná*) (1899). Ok horojn da taglaboro (1899).

El ĉi tiuj libroj ni ekkonas ĉefe la religian konvinkon de Masaryk. En ili Masaryk postulas pliperfektigon de la homa karaktero kaj pliprofundigon de la sento. Li postulas ke la homoj fariĝu pli bonaj, dirante, ke nur tiel ili trovos kontentigon por siaj animoj.

Masaryk neniam estis ŝovinisto, sed neniu el samtempuloj laboris tiom por la kultura bonstato de sia nacio kiel li. Tamen en la propra nacio li havis multajn malamikojn. Li ekbatalis kontraŭ religia apatieco kaj la ekleziaj rondoj vastigis pri li la famon, ke li kontraŭstaras diokredon. Kiam li en j. 1899 kontraŭbatalis la ritualan superstiĉon, defendante tiel la honoron de sia nacio, kiel nacio klera, nekapabla kredi tiun sensencaĵon, tiam

*) Per tiu proceso estis kondamnita al morto hebreo Leopold Hilsner, mortiginta du kristanajn knabinojn. Tiam vastiĝis ĝenerala famo, ke la sango de liaj oferoj estis uzita de hebreoj por ritualaj celoj. Masaryk per tiu ĉi sia verko ekbatalis ĉi tiun ĝeneralan superstiĉon kaj kaŭze de ĝi li estis furioze atakata.

oni popularigis la devizon, ke li defendas hebreojn — certe ne senprofite.

Spite ĉiuj maljustaĵoj al li faritaj Masaryk ne sentis en si maldolĉecon kaj ne retiris sin al privateco. Kiam en la jaro 1910 oni festis lian ses-dekan naskiĝtagon kaj liaj amikoj menciis la atakojn kontraŭ li faritajn, Masaryk respondis: „... Por mia persono mi estas kontenta“.

Tiu ĉi viro ekkomprenis en aŭgusto de 1914, ke la batalo sur Blanka Monto povas esti rebonigita tuj aŭ neniam. La rezultatoj de lia penado altiĝas antaŭ la mondo: dekmiliono nacio kliniĝas antaŭ lia verko. En lia nacio ne estis pli kapabla viro, kiu povus fari la renverson en la sortoj de la nacio. Masaryk prezentiĝis al la gvidantoj de Ententaj ŝtatoj kaj ili ekkonis Bohemon kun akra vidsento, kun klara prudento, komprenantan la tutmondajn problemojn. Kaj tiu Bohemo estis viro de terura energio, kiu malgraŭ sia alta aĝo ne hezitis ĉirkaŭveturi la terglobon, por vekti intereson pri la sorto de katenigita nacio.

Filozofo-demokrato eksidis sur la boheman tronon kaj la liberigita nacio vokas al li hodiaŭ: Vivu! Longe vivu la amata paĉjo Masaryk!

○○○○

LA UNUA KOMUNIKO

de prezidanto Masaryk al la Ĉeĥoslovaka nacio.

(La 22. dec. 1918 kumvenis en la kastelo de Praha ĉiuj membroj de la Ĉeĥoslovaka nacia parlamento kaj oficialaj reprezentantoj de amikaj ŝtatoj, al kiuj la jus el kvarjara ekzilo reveninta Masaryk tralegis sian sekvantan komunikon.)

»Eĉ mi kredas al dio, ke post la forpaso de la ventegoj de kolero, altiritaj sur niajn kapojn pro niaj pekoj, revenos al ci la regado de cial aferoj, ho, popolo bohema, kaj pro tiu espero mi faras cin heredanto de ĉio, kio ajn mi heredis post miaj prapatroj kaj konservis tion malgraŭ la malfavoraj kaj malbonaj tempoj, sed eĉ de ĉio bona, kies plimultigon mi akiris pro la laboro de miaj filoj; tion mi testamente al ci donacas.«

La preĝo-profetdiro de Comenius plenumiĝis laŭvorte, nia nacio estas libera kaj sendependa, ŝatata kaj apogita per ĝenerala simpatio ĝi eniras en la asocion de la eŭropaj nacioj.

Ĉu ni vivas en fabelo? Tiel demandas la politikistoj de ĉiuj landoj kaj mi mem metas al mi la saman demandon. Kaj ĉio

tio estas tamen vera efektiveco, la rezultato de kvarjara luktado de ĉiuj nacioj de la mondo. La mondo dividiĝis je du partioj kaj en la terura batalo venkis tiuj, kiuj defendis la idealojn de la justeco — venkis la idealistoj, la spirito venkis la materion, rajto la perforton, vero la saĝacon.

La centraj potencoj, gvidataj de la prusa Germanio aspiris la regadon super la malnova mondo, super Eŭropo, Azio, Afriko, kaj tio estis la ĉefa celo de la pangermanaj politikistoj, markita per la devizo: Berlin—Bagdad. La malnova puŝo kontraŭ la oriento estis atingota per la fina submetigo de la orientaj nacioj, unuavice de la slavaj, kaj la tuta procedo de la milito kaj la germanaj venkoj efektivigadis la pangermanan planon.

La submetigon de la eŭropa oriento estus sekvinta la submetigo de la okcidento eĉ de tuta malnova mondo. Sed la Nova mondo, Ameriko, eliris el sia rezervo, anstataŭis la lacigitan kaj renversitan Rusion, kaj post nelonge la generalo Foch diktis siajn packondiĉojn al la venkitaj Germanio kaj Aŭstrio.

Teokrata aŭtokratio estis venkita de demokratio bazita sur la principoj de humana moraleco. Berlino, Vieno kaj Konstantinoplo predikis blasfeman doktrinon, ke iliaj ŝtatoj, en efektiveco la dinastioj, estas »el dia favoro«, ja direkte eĉ dia aperaĵo kaj ilo. La ŝtato apoganta sin je militarisma armeo estis fiksita kiel idealo kontraŭ la nacieco: konkiro kaj mondregado fariĝis la celo de berlina, viena kaj konstantinopla carismo — imperialismo. La pruseco, aŭstrieo kaj ĝingišhaneco ne kuniĝadis nur geografie; ekzistas interna konformeco kaj parenceco de tiuj tri postvivaĵoj de la mezepoka teokratio.

Kontraŭ ili grupiĝis la modernaj demokratioj; demokratioj nemilitarismaj, defendantaj la modernajn idealojn de la humaneco. Prusa militarismo, la armeo de militaristaj specialistoj, estis venkita de la popola militaristaro, kiu ĝis dum la daŭro de la milito devis esti organizata kaj ekzercata. La bone konsiderita preparo de Germanio kaj ĝia kombinita atako ne sukcesis. La ligoj, fidelaj al la demokratio, proklamis senkondiĉan rajton por sendependeco de ĉiuj ŝtatoj kaj nacioj, ne nur por la grandaj, sed eĉ por la malgrandaj.

Prezidanto Woodrow Wilson formulis la ĉefajn principojn de demokratio, enhavitajn en la amerika proklamo de sendependeco kaj en la franca deklaro de la homaj kaj civitanaj rajtoj. La Revolucio venkis la legitimistan rigidecon. Ĉiu politika potenco venas el popolo, aŭ kiel tion diris Lincoln: el popolo per popolo kaj per popolo. Kaj prezidanto Wilson anoncis kiel celon de la milito liberigon de la tuta homaro. De la homaro — kontraŭ la kvar centraj potencoj. La tuta homaro kuniĝis, kaj se iam la konsento de la nacioj estis juĝata kiel atesto por la dia ekzisto, tiam la konsento de ĉiuj nacioj el ĉiuj mondo-partoj en tiu ĉi milito estas atesto de demokrata vero. La Prusa militarismo kaj ĝiaj kunuloj estis kaj estas morale izolitaj.

Ni, Bohemoj kaj Slovakoj, ne povis res-flanke dum tiu ĉi monda luktado, ni devis decidiĝi kontraŭ Aŭstrio-Hungario kaj ni devis forlasi la rezervon ĉar nia tuta historio, ĝia enhavo kaj senco gvidas nin al potencoj demokrataj. La konstruo de nia ŝtato kaj ĝia tenado kontraŭ la germana konkiremo al oriento, nia reformacio kaj ĝiaj idealoj, nia suferado de la kontraŭreformacia perforto kaŭzita de Habsburgoj malbonuzantaj la religion por siaj malaltaj materiaj celoj, kaj nia vekigo gvidata per la ideo de humaneco kaj el ĝi devenanta demokratio — la tuta sorto de nia nacio tute logike estas kunigita kun la okcidento kaj kun ĝia moderna demokratio. Tial ĝuste kaj kiel ni vidas, al nia feliĉo, jam de la komenco de la milito ni strariĝis sur la flankon de la ligoj. Por ni ne estis loko en la vicoj de tiuj, kiuj ĵetadis sin je ni, estante gvidataj per barbara devizo de la Mommsen, von Hartmann kaj Lagarde.

Permesu al mi, amikoj, ke mi prezentu la raporton pri nia eksterlanda agado. Mi devas limigi min je la ĉefaj punktoj, ĉar la historio de tiu kvarjara laboro estas longa kaj riĉenhava. Mi limigos min pli je akcentigo de la principoj, gvidantaj nian laboron ol je parolado pri unuopaj agoj.

Al mi mem estis klare, ke mi ne povas kaj ne devas resti en la servoj de Aŭstrio-Hungario. Estas vero, komence mi ne estis sufiĉe decidita al ago, mi sentis teruran respondecon, mi konsideradis la rezultojn de la malvenko — sed niaj soldatoj rifuzantaj servi kaj submetiĝantaj

sin al la liganoj, la krimaj ekzekutoj de niaj homoj ĝojantaj pro la promeso de la rusa arme-estro, kaj entute la tuta apá-
raio de viena kaj budapesta tiraneco, de-
vigis min al decido. Mi konsiliĝis kun la
politikaj amikoj unuope, ĉar la partioj
estis subpremitaj. Mi veturis ankaŭ en
Vienon por paroli kun seriozaj aŭstria
Germanoj, kion ili propre atendas de la
milito, precipe en okazo de venko. Dufoje
mi estis en Holandio. Mi travojaĝis Ger-
manion kaj ankaŭ tie mi laŭeble penis in-
formiĝi. En duono de decembro 1914 mi
forveturis en ankoraŭ neutralan Italion
kaj poste en Svison. Mi kredis, ke mi an-
koraŭ pruvos reveni al Praha, por prezenti
la akiritajn informojn, sed ĝi jam ne estis
ebla. Poste mi denove restis en Ĝenevo
kaj en aŭtuno 1915 mi forveturis por ĉiam
tra Parizo en Londonon, de kie mi ofte
veturadis en Parizon. En Parizo restis dro.
Beneš kaj generalo Štefánik, la sindonaj,
fidelaj kaj efikaj kunlaborantoj. En majo
de la lasta jaro mi devis veturi en Rusion
de kie mi en la nuna jaro komence de
marto veturis tra Siberio en Japanion, el
Japanio en Usonon, de kie mi post sepmon-
nata restado, vokata de nia registro, reve-
nas post kvar jaroj kiel la unua prezidanto
de Ĉeĥoslovaka respubliko.

Stranga, ne atendita vojaĝo ĉirkaŭ la
mondo, en efektiveco vojaĝo propaganda,
akrado de la tuta ligana mondo por nia
nacia afero kaj por nia politika programo,
kies ĉefa parto estis disbato de Aŭstrio-
Hungario kaj per ĝi la izoligo de Germa-
nio por devigi ĝin, de ĝi fine kontentiĝu
kun sia propra nacia teritorio. Kaj pri tio
oni ja traktas. Aŭstrio estis forta eĉ mal-
forta flanko de Germanio.

Eksterlande ni organizis ĉiujn koloniojn
de niaj elmigrintoj kaj komencis bone
konsideritan propagandon personan eĉ
publicistan kaj laboron diplomatan. Sed
la politiko kaj ĉefe revolucio ne estas ebla
sen mono — kaj en tio helpis la niaj en
Ameriko kaj Rusio. — Mi volas tie ĉi kon-
stati kun akcento, ke ni prenis de la li-
ganoj eĉ ne unu heleron — mi akcentigas
tion, ĉar niaj kontraŭuloj parolas pri rusa,
angla kaj alia mono. Kaj egale mi konsta-
tas tie ĉi, ke dum tiu tuta tempo ni uzis
eĉ ne unu mensogon kontraŭ niaj mal-
amikoj, eĉ ne unu el tiuj tiel nomataj
diplomataj ruzoj — kaj tiel honesta poli-

tika batalo, tiel honesta revolucio mi tion
povas diri, apenaŭ estis iam farita.

Estis klare al mi, ke ne sufiĉos propa-
gando, eĉ ne revolucio en la armeo kaj
hejme, sed ke ni devas havi militistaron.
La unuaj legioj devenis en Francio kaj en
Rusio. Baldaŭ aliĝadis memvoluloj el
ĉiuj landoj: Anglio, Ameriko, Kanado,
Afriko, Aŭstralio. Komence ĝi estis partoj
malgrandaj, sed ili kreskis per alvenado
de la kaptitoj. Tio rilatas ĉefe Rusion, kie
estis tre granda kvanto da niaj kaptitoj.
Historio de nia armeo en Rusio estas hi-
storio de la tuta Rusio; almenaŭ la evoluo
de Rusio rebrilas en la evoluo de nia
armeo. Jen mi povas mallonge diri, ke la
malnova reĝimo de Sturmer ne inklinis
la formadon de granda armeo. Ankaŭ Ke-
renskij nin komence kontraŭstaris, ĝis li
ekkonis, ke lia ofenzivo estis grandparte
farita per niaj tri regimentoj kaj ke niaj
knaboj kovris la fatalan forkuron de la
rusa armeo. La laŭdaj prijuĝoj de Brusilov,
Alexejev kaj aliaj, simile eĉ de la
francaj kaj italaŭ aŭtoritatuloj pri la ku-
raĝeco de nia militistaro estas konataj.
Post multaj kaj multaj provoj oni sukse-
sis organizi tutan korpuson — mi povas
diri sen pligrandigo, ke organizado ke tiu
armeo dum la komenciĝinta anarkio kaj
en plena renverso de la rusa armeo estas
la plej bona atesto de matureco ne nur de
niaj knaboj, sed eĉ de la tuta nacio, ĉar
centmilo da viroj, viroj balotantoj, estas
grava reprezentanta parto de la nacio. Kaj
la armeo en Rusio kreskis en tiu ĉi jaro
preskaŭ je 50.000 armitaj viroj, aliaj 50.000
estis aliĝintaj. Mi ne povas alie, ol peti
vin, ke ni esprimu estimon al tiuj niaj
karaj knaboj, al tiuj niaj herooj en Rusio,
Dobruĝa, Francio kaj Italio eĉ sur la
fronto de Saloniki, kiuj preparis al ni la
hodiaŭan memorindan kunvenon eĉ nian
tutan liberigon kaj ni ne forgesu la mar-
tirojn de aŭstria terorismo hejme, eĉ la
milojn kaj milojn da oferoj de la rusa
kaptiteco, kiuj mortis en Murman, Turke-
stan, ĉie sur vastaj plataĵoj de malfeliĉa
Rusio, nekapabla zorgi pri la sano de niaj
kaptitoj. Kiom da niaj knaboj pereigis
dum forkurado tra Albanio — la boĥemajn
tombojn ni havas en ĉiuj militantaj
landoj. ,

Kaj mi ne povas min deteni por ne es-
pri mi dankon kaj kontenton pro konduto
kaj politika procedo via, amikoj, eĉ de la

tuta nacio de Bohemoj kaj Slovakoj. Eble prijuĝo de mi, kiu ne estis ĉiam sufiĉe kontenta, havas certan valoron; certe mi samtempe prezentas pruvon, ke la »sankta« malkontento ankaŭ ne malutilas.

Nia militistaro batalanta sur tri frontoj al militis nian liberecon. La historio de nia eksterlanda agado kaj ĉefe de nia militistaro, de ĝiaj bataloj kaj heroaĵoj, la historio de la siberia anabazo — tio ĉio estos riĉa eduka epopeo por nia estonta generacio.

Francio la unua aprobis en februaro 1916 la signifon de nia nacio por la ligoj kaj la unua ĝi poste aprobis nian Eksterlandan nacian konsilautaron, organizis kaj vivotenis nian armeon en Francio kaj poste eĉ en Rusio ĝi kondukis kontraŭ ni tre grandanime.

Italio estis ĉiam tre amika al ni. Ni havis tie nian armeon kaj ni trovis tie aprobon. Ĉiuj aliaj ligoj turnis sin poste al ni kun tuta simpatio, aprobis nin Anglio, Usono, Japanio, Serbio, Belgio, Grekio kaj Kubo. Mi ne scias, kiun danki unue. Estas nature, ke la aprobo de la Unuigitaj ŝtatoj kaj de Anglio, de tiuj plej grandaj liganaj ŝtatoj, nin multe fortigis, kiel estis videble el la konduto de la malamika tendaro. La Unuigitaj ŝtatoj disponigis kaj disponigas al ni el sia riĉaĵo abundan helpon kaj ni havas de ili certajn promesojn eĉ por la estonteco. Prezidanto Wilson mem dediĉas al nia problemo grandan kaj sinceran atenton. Per dankemo ni estas ligitaj al li eĉ al ĉiuj ligoj kaj ili povas fidi je ni por ĉiam. Niajn sentojn al ili mi plej bone esprimos per la vortoj de nia ĉefministro Kramář, kiu per la unua radio-telegramo, kiu kunigis Prahon kun Parizo ordonis al mi certigi la liganajn registarojn kaj naciojn per nia dankemo kaj per neŝancebla fideleco: »Nia respubliko restos por ĉiam fidela al la ligoj«.

Post kiam la ligoj nin oficiale aprobis, ni konstituis la registaron; la nacio hejme esprimis konsenton kaj komisiis la regadon al vi kaj al mi.

La ĉefa celo de la milito kaj de la paco estas la reorganizo de la orienta Eŭropo kaj la solvo de la orienta demando entute. La milito estis daŭrigo kaj kompletigo de la bataloj kaj de la provoj pri la solvo de la orienta demando en vasta senco de la vorto. La' germana penetra-

do kontraŭ okcidento estas direktita kontraŭ la ĉeno de pli malgrandaj kaj de malgrandaj nacioj, loĝantaj inter Germanio kaj Rusio, komencante per Finnoj kaj finante malsupre per Grekoj. Ĝi estas vico de dek-ok malgrandaj nacioj. La pangermanistoj predikis, ke la malgrandaj nacioj ne havas estontecon, ke la historio celas al konstruo de grandaj ŝtatoj. Tiu ĉi opino estas evidente malĝusta, ĉar de la dek-oka jarcento ĝis hodiaŭ devenis tuta vico de malgrandaj ŝtatoj.

La negativa tasko de la milito estas finita, nun por Eŭropo komencas tasko pozitiva, organizi la eŭropan orienton kaj per tio Eŭropon kaj homaron entute. Ni staras sur la sojlo de nova epoko, kiam la tuta homaro sentas sian unuecon. Nia nacio volas kun plena konscio helpi al efektiviĝo de tiu ĉi grandioza kaj nobla tasko. Ni scias, ke la nacioj atendas novan, krecan kaj organizan politikon, kaj ni promesas, ke ni honeste provos ĉi tiun politikon.

Bismarck diris, ke kiu estas estro de Bohemio, estas estro de Eŭropo. Per sia maniero li tiel signis specialan situacion de nia nacio. — Ni estas la plej okcidenta slava branĉo en la centra Eŭropo kaj ni rezistis la germanigan penetradon de Germanoj kontraŭ l' oriento. La hodiaŭan venkon ebligis al ni nia nacia persistemo kaj kune eĉ nia lando riĉa de la naturo. Nia venko estas ankaŭ venko de la aliaj nacioj, minacataj de Aŭstrio kaj Germanio.

Simila sorto kaj la sama danĝero ordonas al ni proksiman amikecon kun niaj najbaroj oriente kaj eble eĉ sudoriente. Kun ĉiuj ĉi tiuj nacioj, Poloj, Ukrainoj, Sudslavoj, Rumanoj, Litovoj kaj Lejtoj, Finnoj, Grekoj kaj Albanoj, mi ekligis eksterlande amikajn rilatojn. En Ameriko ni provis krei Union de centro-eŭropaj ŝtatoj. — Ĝis nun aliĝis dek-du nacioj kaj la intertraktado promesige vastiĝis. Ameriko vive interesiĝis pri la Unio, sur ĝia fundamento devenis speciala »Asocio por subteni mezeŭropajn ŝtatojn«, kiu, mi tion esperas, valore helpos al la granda verko. Wilson mem multe ŝatis la Union, kaj vivan intereson trovis ĉe li ĝia peno helpi al la solvo de la problemo pri malgrandaj nacioj. Mi povas nun nur mallonge skizi niajn plej proksimajn taskojn. Generale

dirite: ni volas organizi kun niaj najbaroj kaj proksimaj nacioj plej intimajn rilatojn.

La najbara kaj simila historio resendadas nin al politika amikiĝo kun Poloj. Pri tio mi multe traktis kun ĉefaj viroj polaj. Ni eĉ konsideris federacion, sed ni diris al mi, ke ĉiu nacio havas multe da sia speciala konstrua laboro por la proksima estonteco kaj tial ke estos pli bone ne kompliki la taskojn. Sed ni penas atingi kontrakton ekonomian kaj militistan. Ĝi ja estos nur pure defenda. Ni ankaŭ traktis pri la pola problemo en Silezio. La interkonsento estas facila — rilate la problemojn, kiuj nin atendas ĝi estas problemo nur negrava. Ke ĉiu el ni estu kiel eble plej forta estas intereso de ni ambaŭ. Tamen mi devas diri, ke mi opinas ne permesebla la manieron, per kiu kelkaj Poloj penas preprigi al si nian teritorion. Antaŭe ni devas tutigi la teritorion de nia ŝtato kaj poste ni povas korektigi niajn limojn. Mi esperas, ke Poloj aprobas ĉi tiun vidpunkton tiom pli, ke ilia ekzemplo povus danĝere instigi la aliajn al similaj provoj kontraŭ la Poloj mem. Kiam Poloj havos sian ŝtaton fiksita, tiam oni povos trakti de ŝtato al ŝtato.

Koncerne la Germanojn en niaj landoj estas nia programo de longe konata: la teritorio loĝata de Germanoj estas nia kaj restos nia. — Ni konstruis nian ŝtaton, ni ĝin tenis kaj ni ĝin denove konstruas. Mi dezirus nur, ke ankaŭ la Germanoj ĉe tio kunlaboru — ĝi estus pli bona politiko ol ilia ĉisnuna erara penado. Tamen mi komprenas kaj supozas, ke ili estas en malfacila situacio: bedaŭrinde ili tro volonte konfesadis sian pangermanan kontraŭboheman planon, ili ne komprenis la tutmondan situacion, ili estis ebriaj per la unuaj ŝajnaj sukcesoj. Niaj Germanoj fariĝis oferoj de mensogema aŭstrieo kaj de miopaj Habsburgoj.

Mi ripetas: Nian ŝtaton kreis ni. Per tio oni destinas ŝtatrajtan situacion de niaj Germanoj, kiuj origine venis en la landon kiel enmigrintoj kaj koloniistoj. Ni havas plenan rajton je la riĉeco de nia teritorio, necesega por industrio nia eĉ de la Germanoj loĝantaj inter ni. Ni ne povas kaj ne volas oferi niajn gravajn minoritatojn bohemiajn en tiel nomata germana teritorio. Ni estas ankaŭ konvinkitaj, ke la ekonomia prospero resendadas niajn germanajn samlandanojn al ni. De ili depen-

das la elekto de ĵusta pozicio rilate al ni. Ili memoru ke en la jaro 1861 ili petis kune kun ni la imperiestron, ke li sin lasu kronigi je bohema reĝo. Mi deziras sincere, ke ni baldaŭ interkompreniĝu. Mi konfesas, ke por ni estas malfacile forgesi, ke niaj Germanoj kaj la Germanoj en Aŭstrio entute akceptadis la nehumanajn kruelaĵojn de aŭstria kaj magiara soldataraco sen ĉiu ajn protesto, por ni estas malfacile forgesi, ke niaj Germanoj donadis la plej furiozan kontingenton al la pangermanismo. Sed tamen ni ilin volonte akceptos, se ili decidiĝos por kunlaboro. Per la konstruo de vere demokrata aŭtonomio ni havos konvenan rimedon por la solvo de nacieca problemo.

Nia rilato al Germana Aŭstrio estas donita ne nur per la rezultato de la milito, sed eĉ per nia tuta nacia programo. Ni ja kuniĝis kun Aŭstrio kaj Germanio kaj kreis la monarkion.

Ni estis perlo de Aŭstrio. Tiel ni pruvis, ke ni povas havi amikan kunvinton. Sed Habsburgoj malbone nin rekompencadis. Mi ne povas memori nian tutan batalon kontraŭ Aŭstrio. La milito pruvis, ke la unuflanka politiko germana kaj magiara devis ruiniĝi. Kaj ĝi ruiniĝis senevite kaj por ĉiam. Dualismo finis la habsburgan senkapablecon kaj falsecon. Ĝi estis kompleto unuavice direktita kontraŭ ni. Aŭstrio kaj Hungario fariĝis evidenta organizaĵo por perfortado de majorito per minorito. Antaŭ la milito Eŭropo tion ne atentis sed per la milito ĝi estis instruita pri la vera stato, kaj ĉefe en Francio, Anglio kaj en Usono oni ekkomprenis la mirigan falsecon de Aŭstrio kaj de la magiara politiko, montriĝanta per multaj provoj trompi la liganojn. La habsburga kaj magiara propagando estis nia valora helpanto. Cetere la Germanoj en la regno spertis la Habsburgojn sur la propra korpo.

Ne estas mia tasko doni konsilojn al la aŭstria Germanoj. Estas nature, ke la kuniĝo de niaj landoj kun Aŭstrio postlasis multajn, ĉefe ekonomiajn rilatojn. Se la aŭstria Germanoj forlasos sian regemon, se ili forlasos la pangermanajn planojn, se ili estos kontraŭ ni lojalaj kaj neintermiksos sin en niajn aferojn, tiam estos eblaj la decaj najbaraj rilatoj. Mi opinias ke oni povus tiel solvi la malfacilan problemon de Vieno, plejkonvene por la Ger-

manoj mem. Tie ĉi memkompreneble nin gvidas la konsideroj pri nia granda minorito en Vieno.

Nian rilaton al Germanio ni aranĝos laŭ tio, kian politikon ĝi komencos. Ni kondukos tute korekte. Ni deziras, ke la malvenko de prusa agresiva militarismo estu venko de germana popolo, ke la germana popolo alkiutimiĝu moderiĝi je propraj naciaj fortoj, kaj dediĉu siajn grandajn fortojn kaj kapablojn al internacia organizo de nacioj kaj de la homaro. Ĉi estas multe pli granda kaj pli nobla celo, ol la celo pangermana.

Pri Magiaroj ne estas necese vastigi la parolon. Ĝis la sesdeka jaro de la pasinta centjaro ili ludis rolon modestan; sed en tiu tempo valoriĝis la fruktodoneco de ilia tero kaj tiel ili akiris gravecon por la industria partoj de Aŭstrio. Samtempe ili provis eluzi la politikon de Bismarck kontraŭ Aŭstrio kaj ili fariĝis sindonema antaŭgvardio de Germanio sur Balkano. La feŭdala nobelaro subtenata de kapitalistoj konstruis tiun ŝtatan konstruaĵon, kiu falruliĝis per la ekpuŝego de la milito tiel, kiel la tuta arta konstruaĵo de Habsburgoj. Estis vera sensecaĵo, ke tia nacio, kia estas Magiaroj, povis tiel longe ekspluati kvar aliajn naciojn — niajn Slovakojn, Rutenojn, Rumanojn kaj Jugoslavojn. Jam Cavour vidis klare, ke Magiaroj ne scias respekti la liberecon de aliaj nacioj, kvankam ĵus ili devis sin defendi kontraŭ Germanoj. Politike la Magiaroj vivis ankoraŭ dum la milito el la prestiĝo de 1848, sed falseco de ilia propagando estis nerimarkita kaj hodiaŭ la liganoj vidas, ke Magiaroj havas rajton sole je sia propra ŝtato. Mi dezirus, ke nia rilato povu baldaŭ reguliĝi prudente. La magiaraj minoritoj ĝuos ĉiujn civitanajn rajtojn. Magiaroj estis tre kruelaj dirante: Slovako ne estas homo, — ni ne repagos al ili per malbono. Ni deziras nur, ke Slovakio havu siajn limojn konvenaj por sia ekfloro. Kaj la samo rilatas ankaŭ la Rutenojn aliĝantajn al ni.

Mi volas fini. Mi scias, ke ni ne atingos nian nacian programon nur per eksterlanda politiko, ke ni devos labori ĉefe interne. Eĉ en tio estos nia politiko laŭ Havlíček honesta kaj prudenta.

Dum la transira tempo ni penos konservi la ordon, ni volas dediĉi nin al la trankvila laboro administra. La substanco de

la demokratio estas en administracio kaj aŭtonomio. Demokratio ne estas regado, sed laboro por garantii la justecon. Kaj la justeco estas matematiko de la humaneco.

oooo

LETERO DE PROF. T. G. MASARYK AL G. V. PLECHANOV.

(El. »Ruskija Vedomosti« 18. nov. 1917)

Mi alveturis Moskvon el Petrogrado la 28. okt. sabate matene kaj el la stacidomo Kurskij mi iris direkte al la Teatra placo, kiun oni ĵus komencis pafataki de ambaŭ flankoj. Feliĉokaze (hodiaŭ mi tion povas diri), mi sukcesis trovi loĝejon en hotelo »Metropol«, kiu baldaŭ fariĝis centro de bolŝevistaj atakoj. Junkeroj baris sin en la hotelo, kiu estante solida konstruaĵo, servis kiel bonega fortikaĵo. La bolŝevistoj okupis la kontraŭajn konstruaĵojn, ĉefe la teatron de Nezlobinov. La venkoakiro de la hotelo permesus al la bolŝevistoj plifacilan alireblon al la magistrato (dumo), sekve de kio ili sieĝis ĝin tre energie.

La junkeroj submetiĝis nur en la nokto de 20. novembro (rusa kalendaro). La tutan sieĝon de la hotelo mi elsuferis kun ĉiuj teruroj kaj mi trovis min en la manoj de bolŝevistoj, la soldatoj de la ruĝa gvardio.

Da similaj okazintaĵoj, kiujn mi travivis, mi povus rakonti kelke. Ekzemple la soldato de la ruĝa gvardio kun pafilo kaj oficira sabro alligita sur ŝnuro, respondis mian demandon, kiam li enlasos la publikon: »Se mi volas, mi enlasos, se mi ne volas, mi mortbatos; nun estas mi la signoro tie ĉi.«

Tamen ekzistis bolŝevistoj eĉ de alia epoco. Unu el ili mi priskribos.

Gardostaranta soldato staris sen armilo antaŭ unu el la ĉambroj. Petinte permeson, li sidiĝis sur kanapon. »Mirinde, kia sangverŝado!« Tiu ĉi rimarko de mia najbaro donis al mi la eblon direkte lin demandi kaj komenci interparolon. Intelligentulo — li havis blankajn molajn manojn — konanta la socialistan literaturon, li konis ankaŭ kelke da miaj verkoj kaj memoris nian politikon (Rim.: Koncerne Masaryk kaj Plehanov), li sciis, ke miaj opinioj pri la milito kaj la tutmondaj problemoj nun tute identiĝas.

Kiel vera Ruso, mia kunparolanto transiris sur la kampon de plej ĝeneralaj eternaj veroj. Mi penis al li pruvi, ke Rusio atendas nun de kiu ajn registaro laboron administran. Tial ke la rusaj revolucionemuloj al kutimiĝis al la laboro, kiu ruinigas (mi diras, ke sen ĝi oni ne povis agi), kaj al ĝi ili submetiĝis preskaŭ entute. Enferminte sin en sian rondon, ili perdis la atenton pri la ekstera mondo. Kvankam ili vivis en Eŭropo, ili ne ekkomprenis ĝin, same kiel ili ekkomprenis eĉ ne Rusion. Ilia rezisto kontraŭ la carismo ne permesis al ili studi le organizon ŝtatan. Ili konatiĝis eĉ ne kun la ĝeneralaj movfortoj de la nacia vivo. De tie venas iliaj senfinaj diskutoj sen ĉiu-ajn ago, la konfliktoj anstataŭ laboro.

»Mi tion allasas,« respondis mia bolŝevisto, »sed tio ne rilatas sole la rusajn socialistojn, sed eĉ socialistojn alilandajn — ankaŭ Kerenský.«

Tute ĝuste vi parolas.

»Ni havas alian opinion pri la registaro, kiun la kadretoj ne volas aprobi. Ni ĵus prenas la regadon en niajn manojn.«

Mia kara, preni la regadon en siajn manojn ne signifas ĉiam regi. La reĝo reĝas — sed ne ĉiam li regas. La uzurpo de la regado povas esti rezultato de pura despotismo. Vi, rusaj socialistoj, devas scii la regadon, vi devas ordigi vian administradon. Tio ŝajnas al vi malfacila, kiel pruvas la ekokupo de »Metropol«. — Estas necese rimarkigi, ke la bolŝevistoj ekokupis »Metropolon« kiam ne plu estis en ĝi la junkeroj. En la hotelo troviĝis 5—600 personoj, viroj, virinoj kaj infanoj — gastoj kaj servistaro. La tasko de la bolŝevistoj estis forigi la publikon kaj ekokupi la hotelon. Por tio ili bezonis unu kaj duontagon. Ĉio povis esti farita dum kelkaj horoj, ĉar la publiko ne kontraŭstaris, kontraŭe ĉiu volis foriri.

La traserĉo de la personoj (ĉu ili ne havas armilojn) kaj ekzameno de pasportoj postulis tro da tempo. La komandantoj de milistaj taĉmentoj kaj de la ruĝa gvardio donadis ordonojn, kiuj reciproke malakordiĝis. La pli prudentaj bolŝevistoj elĉerpis siajn kapablojn per observado de tiuj, kiuj povis fari malkorektaĵojn. La komandantoj kaj komisaroj donadis promesojn, kiujn ili ne plenumadis. Ekzemple al ni fremduloj ili jaŭde promesis foriron por vendredo je la 10. horo, sed la komisaro ne

alvenis kaj post multaj embarasoj ili liberlasis la publikon sen pasportoj. La bolŝevistoj siegis »Metropol« dum ses tagoj. Ili devus havi, aŭ almenaŭ povus havi planon, kion ili faros kun tiu ĉi konstruaĵo, sed ili ĝin ne havis. En »Metropol« estis 600 personoj, en Rusio estas 170 milionoj da ili. Ĉu la kapablo de bolŝevistoj respondas al tiu ĉi kvanto?

Sed tio ne estas la ĉefa problemo. Antaŭ ĉio oni devas antaŭmeti la demandon, ĉu la ribeliĝo de la bolŝevistoj estis efektive necesa. Inter ni demokratoj ne povas esti kaj ne estas dubo pri la celo de ribeliĝo entute. Sed mi certigas ĉi tion: Kiam Rusio seniĝis de absolutismo, estis proklamita la respubliko, aranĝita parlamento kaj konstitucia libereco, ne ekzistis jam kaŭzoj politikaj eĉ ne moralaj por revolucio, eĉ ne en la okazo, se ni konfesos malfortecon kaj nekapablecon de la provizora registaro.

Kial ekzemple oni ne finatendis la kunvenon de la konstitucio-dona parlamento? Kial nun, en vintro, rapidi kun solvo de radikala agrikultura programo? Ĉu estas eble kredi, ke en la malgranda pligrandigo de kampistaj posedaĵoj kuŝas la solvo de la agrikultura krizo? Mi ripetas denove: Tiu ĉi sanga liberiĝo ne estis neevitebla kaj tial ĝi malhavas bazon. La direkta celo de la politiko estas ŝpari la homajn vivojn kaj celoscie trakti la naciajn fortojn. La grado de vera kulturo kaj de barbareco estas mezurata laŭ tio, kiel la personoj kaj nacioj scias ŝpari la homajn vivojn ne nur dum la milito, sed eĉ dum la pactempo. Mi memoras, kiel Tolstoj iam dum unu el miaj vizitoj ne aprobis ĉi tiun vidpunkton kaj li riproĉis al mi timon pro la morto. Sed en tiu ĉi afero, kiel en multaj aliaj li nur eldiris eraron, propran al la Rusoj.

Ĉiun revolucionan movadon oni devas juĝi laŭ ĝiaj fruktoj. Mi konfesas, ke ne ĉiuj sekvoj de la bolŝevista revolucio estas ankoraŭ rimarkeblaj, sed estas videble, ke la politiko de bolŝevistoj estas malmulte reala. Ilia plej unua peno estas paco, sed en efektiveco ili plilongigas la militon. La decidiga ofensivo en junio estus plirapidiginta la pacon per la malfortigo de Aŭstrio. La bolŝevistoj predikas kontraŭ la milito, ili protektas Germanojn, sed ili ne ŝparas la sangon de siaj propraj fratroj.

La bolŝevistoj atendas helpon ĉefe de la germanaj socialistoj, sed la germana armeo konsistanta el socialistoj antaŭenmarŝas kontraŭ Petrogrado kaj okupas rusajn teritoriojn.

Ĉi tiuj argumentoj rapide skizitaj ne restis sen efiko je mia bolŝevisto. Li komencis dubi pri la neceseco de tiu ĉi ribeliĝo.

Volonte mi estus sciinta, kiel li kondutos ĉe siaj administrativaj taskoj kaj mi komencis lin observi. Baldaŭ post nia interparolo li konatiĝis kun sinjorino, kiu certigis pri si, ke ŝi estas Francino, sed efektive ŝi estis Rusino, edzino de kavaleria oficiro, kaj kiel estis videble, ŝi forte lin impresis. Li tuj estis servema el ŝi, li portadis ŝiajn skatolojn kaj pakaĵojn.

La Germanoj malamas Francojn, sed volonte ili trinkas ilian ĉampanan vinon, la bolŝevistoj malamas burĝojn kaj kapitalismon, sed volonte ili dividas inter si iliajn malfortajn flankojn kaj mankojn. Kaj »Metropol« — jen la kapitalisme-burĝoa senenergieco — mi ne diru pli.

Ne, amiko, Rusio bezonas revolucion en la kapoj kaj en la koroj.

Via

T. G. Masaryk.

○○○

„THE TIMES“ PRI MASARYK.

La plej granda gazeto de la mondo „The Times“ skribis la 2. dec. 1918 okaze de la reveno de Masaryk al Londono:

„La unua prezidanto de la nova respubliko Ĉeĥoslovaka estas senmezure simpla kaj bonkora viro. Dum sia tuta vivo li estis apostolo, sed li ne estis revulo. Klarvideco, en la senco de intensa komprenado kaj antaŭvidado de la aferoj venontaj estas lia ĉefa karakterizo, kaj tiu ĉi eco estas kompletigata per egale potenca sento por tio, kion oni povas en est-anteco efektiviĝi.

Naskodevene li estas moravia Slovako. (Sekvas lia biografio).

Kiel politika gvidanto li alkondukis la ĉeĥoslovakon demandon antaŭ la tutmondan forumon kaj pruvis, ke ĝi povas esti solvata sole per radikala ŝanĝiĝo de Aŭstrio, kio signifis ĉe li laŭ aliaj vortoj: Aŭstrio devas malaperi.

Inter liaj historiaj kaj filozofaj studoj ĉefe distingigas la libro „Sociala demando“, la kritiko de la marksisma socialismo, kaj la grand-

ioza verko „Rusio kaj Eŭropo“, kiu estas unika en sia speco.

Masaryk estis instiganto kaj helpanto de la tradukoj el angla lingvo bohemen, kie lia influo tuŝis ne nur tutan junularon boheman, sed eĉ grandan parton de Jugoslavoj kaj Rutenoj. Estante en la jaro 1907 sendita per ĝenerala balotrajto denove en aŭstrian parlamenton, li kuraĝe malkovradis la krimojn de aŭstro-hungara mastrumado en Bosnio kaj Hercegovinio, li defendis Serbojn kaj Kroatojn en decembro de 1900 dum la proceso en Zagreb. En la jaro 1909 li helpis dum la proceso de Friedjung malkovri la falsajojn, per kiuj grafo Aerenthal motivis le anekson de Bosnio kaj Hercegovinio.

Kiam eksplodis la mondmilito, Masaryk restis dum iu tempo en Praha por tie organizi la interrilaton kun eksterlando, poste en decembro 1914, li forkuris en Italio kaj de tie li venis en Londonon. Senprokraste li estis aprobita kiel gvidanto en la nacia lukto por libereco kaj kune kun dro. Beneš kaj kapitano Štefánik li kreis triumviraton, kiu estis aprobita per brita registaro eĉ per la ceteraj Ententaj registaroj, kiel reprezentanto de estonta ŝtato Ĉeĥoslovaka.

En printempo 1916 li estis vokita de prof. Miĵukof en Rusion, kie li baldaŭ ekkomprenis la rusan senpotencon, kaj tiam li koncentrigis ĉiujn siajn fortojn por krei ĉeĥoslovakon armeon, kies spertoj en Rusio apartenas al la plej dramaj trajtoj de la mondmilito. Nun li alveturas de sia soldataro tra Vladivostok, Tokio, Washington en Londonon.

En Usono li ofte konsiliĝis kun Wilson kaj havis influon je publika opinio amerika“.

○○○

FRAGMENTOJ

et paroloj kaj verkaro de Masaryk.

(Trad. M. Kubásková.)

Mi ne estas kontraŭulo de la religio kaj konstatas tion kontraŭ tiuj sinjoroj (klerikaluloj); mi estis en mia vivo eĉ ne unu sekundon ateisto malgraŭ ĉiuj mensogoj, kiujn vi kontraŭ mi senĉese kaj senĉese eldiradas, sed kiel dirite, mi hontas pri la religiaj sentoj paroli kun vi. Sed mi devas kaj povas ĉi tie paroli kiel Bohema. Kiel filo de la nacio kiu havis siajn Hus, Hlčický, Komenský. Ĉi tiu nacio en sia plimulto estos neniam klerikala, kaj ĝi ne povas esti. La Bohema nacio estis la unua, kiu rompis la katenojn de Romo en la husida reformacio kaj se unu el la ora-

toroj ĉe la katolika kongreso kiel idealon prezentas Ferdinandojn kaj kontraŭreformacion,* ni devas kiel bohemiaj politikistoj, kiel filoj de la bohema nacio, la kontraŭreformacion kun sia religia perforto kaj teruraj konfiskacioj de la bienoj — preskaŭ tri kvaronoj de la tuta lando estis konfiskitaj — nur kondamni.

La naturaj fundamentoj de la religioj trovis de longa tempo aprobon. Sed supernaturajn, mi diras tion al vi malkaŝe, mi aprobi ne povas, ne pro tio, ke mia intelekto estas fiera — kiel ĉiam la simpla senco diras. Ne, sinjoroj, vi havas eĉ ne ŝajnon, kiel multe da larmoj la homo devas elverŝi, por — kiel mi estis hieraŭ dirinta, trovi sinceran vidpunkton rilate la religion kaj plej terura estas tio, ke la oficiala eklezio ne volas kompreni ĉi tiun nian aferon de koro pro tio, ke ni ne povas aprobi ĝiajn principojn. Jezuo Kristo, kiun ni alvokas, venus hodiaŭ al ni ateistoj kaj tiel nomataj materialistoj, kun ni li rilatiĝus, ne kun tiuj, kiuj opinias esti la solaj gardantoj de la religio kaj eklezio.

Jezuo proklamis farizeojn kaj leĝistojn kiel ĉefaj kontraŭuloj de sincera kredo al Dio kaj vera religio kaj ritatiĝis kun doganistoj kaj kun ĉiuj, kiuj estis perditaj.

Sociale problemoj ne estas sole problemoj laborista. La problemoj sociaj ne estas sole problemoj de unu klaso aŭ kasto, ĝi estas problemoj de ĉiuj. Cedi la premon de laboristoj, donante al ili la ĝeneralan balotrajton, estas nur parto, neplena kaj negativa solvado; la problemoj devas esti solvota plene kaj positive, kaj tio signifas lumigi kaj varmigigi la kapojn kaj la korojn de ĉiuj, ĝi signifas doni povon al la intelekto, super la materio, ĝi signifas subpremi la egoismon. La problemoj sociaj, estas problemoj de moraleco — malmoraleco estas problemoj de perforto kaj efika humanismo.

Demokratio signifas altigi popolon, ne sin malaltigi antaŭ ĝi, ne flati ĝin, ne tuj plenumi la efemerajn, miopajn instinktojn kaj kapricojn de la popolamaso.

Havi dubon pri la ekzisto de Dio, malaprobi religion eklezian, ne estas senreligieco, tio estas la serĉado de la religio pli alta. Eĉ la negacio (nihilismo) mem ne estas senreligieco: la senreligieco estas

indiferentemo, kaj eble eĉ cinismo ligita kun ĝuamo.

Ni devas venkobati malbonon per bono. Ni devas forĵeti ĉiun perforton sed konsekvence, alie ni ne venos antaŭen. Ni povas, kaj ni devas nin defendi. Ekstremokaze eĉ per fero, sed gardu nin uzi aktivan perforton kaj perforton ĉiam novan.

Ofte la homo, kiu serĉas konvinkon, laciĝas, kaj ne havas poste tiom da forto kaj kuraĝo laboratingi la konvinkon kaj pro troa laciĝo li fariĝas indiferenta. La homoj indiferentaj estas poste la plej grandaj malamikoj de pensado kaj de la homa progreso entute.

Amo al la proksimulo — kiel bela doktrino, sed ĉu tio estas amo efika? Ni povas ami proksimulon, sed ni ĝojas, se ni ne vidas lin. Ni ĵetas kelkan moneron, kiam renkontas nin mizerulo malpura, disŝirita, malsana, ni donas al li rapide ion, per ke ni ne plu vidu lin. Posedi socialan pacon, tio estas amo al la proksimulo. Kaj poste ni parolas pri la socialigo de la eklezio kaj de la religio! Mi rememoras Dostojevskij, kiel li pritraktas filantropion, kiu sentis abomenon, vidante almozpetanton; se li estus laŭdire almenaŭ en silkaĵo vestita. Jes, la almozuloj iradu en la frako. La veran efikan amon oni devas montri senĉese; la mizero ne ĉesas, kiam ni ĝin ne vidas; kion la statistiko, kion tiuj teruraj ciferoj signifas? Ĝi signifas homajn estulojn, signifas mizeron kaj malriĉecon de milionoj da homoj, mizeron kaj malriĉecon ekonomian kaj moralan, dume nur malgranda nombro da ili estas ekonomie kaj morale garantiita.

Mi ne estas kontraŭulo de l' religio, ne kontraŭulo de l' eklezio, sed por mi la eklezio estas afero de l' konscienco kaj de koro.

Nia popolo posedas fortan politikan temperamenton, sed mankas al ĝi kaj al ni ĉiuj pli perfekta politika eduko. Pri tio estas kulpa nia inteligentularo.

La etiko ne postulas sole, ke la instruisto estu bona, sed ke oni donu al li ankaŭ tion, kion apartenas al li.

La moderna asocio bezonas pli altan edziĝemon kaj amon. Ni devas pli multe

*) Epoko post la milito sur Blanka Monto, kiam oni devigis la bohemian popolon aliĝi perforte al la eklezio katolika.

es'imi la virinon, pli multe ŝati ŝin. Opinio, ke la virino estas ĉi tie por la viro, ke ŝia destino estas lumigi, brili, feliĉigi edzon, ke ŝi estas sole arta figuraĵo, nobla ludilo, destinita por la viro, tiun ĉi opinion ni devas fine jam forĵeti. La virino havas ja la saman rajton je memstareco kiel la viro, ŝi ne estas ĉi tie por la viro, same kiel la viro ne estas ĉi tie por la virino.

Ĝar ni estas nacio malgranda kaj bezonas ĉiun forteron por la ekonomia, same eĉ por la kultura kaj politika laboro, ni liberigen egalrajto, ŝi formas pli ol unu duonon de nia tuto nacia.

En la familio devas ĉesi la superregado de edzo super edzino kaj infanoj. La virina movado estas konsekvenco de l' demokratismo, la virino volas havi la samajn rajtojn. Edzo kaj edzino formas intiman unuon, pri la virina problemo ne povas esti eĉ parolate, same ne povas esti parolate pri iu vira problemo. La problemo feministo ne estas sole problemo virina, sed ankaŭ vira, infana, mallonge dirite kultura, homarama.

Ne per ora meza vojo, sed per la konscie progresema.

Pri la patrujo oni bele kantas kaj predikas, sed en inkekreto (efektiveco), kion vidas simpla civitano bohema en sia loĝejo, kiu estas lia patrujo? Kion li scias pri la bohema patrujo, kiam en nekonvenaejo morale kaj fizike liaj infanoj pereas? Al tiu homo vi ne devas iri kun patriota

frazaro; plibonigu lian loĝejon, kaj li ekposedos alian horizonton, li havos alian senton nacian, ol kiam li senkulpe suferas.

La bohema problemo estis kaj estas problemo religia. Tion oni nuntempe nur malfacile komprenas, pligrandparte tial, ĉar la homoj vidas sole la pozitivan religion, opiniante, ke la religio estas ebla nur en siaj historie fiksitaj formoj, kvazaŭ ankaŭ la religio ne estus evoluiĝanta kaj leviganta al pli altaj celoj. Same kiel la nacio evoluiĝas ekonomie, sociale, politike, science kaj arte tiel ĝi evoluiĝas ankaŭ morale kaj religie. Estas vero, ke multaj homoj nuntempe tion ne vidas. Komuna atento okupiĝas per problemoj naciaj kaj socialaj, sed kiu rigardos pli profunden, tiu rimarkos, ke eĉ tie ĉi oni traktas pri la moraleca problemo, tial ankaŭ pri problemo religia.

En la altaj lernejoj fariĝas batalo pri la du kosmogoniaj ideoj le plej intensa, sed ĝi estas gvidata science. La science kaj sur la scienco bazanta nova filozofio estas ĉefe en tiu senco tute libera kaj sen antaŭjuĝoj, ke ĝi rifuzas la historie hereditan kaj malnoviĝintan opinion pri la mondo kaj pri la vivo, bazantan sur la noetika kriticismo kaj sur la eltrovoj en unuopaj fakaj sciencoj. La scienco kaj filozofio rifuzas la teologion ĉefe ankaŭ en moraleco de la religio. Nia tuta moderna opinio pri la mondo kaj pri la vivo, nia scienco, moraleco kaj politiko de-ekleziiĝas, de-ekleziiĝas finfine ankaŭ nia religio.

Se vi volas esti informita
pri la ĝenerala nacia kaj ekonomia vivo en Ĉeĥoslovakio, tiam legu

“LA PROGRESO”

monata gazeto esperanta.

Jara abono 2 Svisaj frankoj pageblaj al la

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,

Bern, Museumstr. 14.

Provnumeron sendas “LA PROGRESO” Plzeň, Ĉeĥoslovakio.

Redaktoroj de fremdlandaj gazetoj ricevos senpage raportojn
pri la lastaj okazintaĵoj enlandaj.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul.
Presis: Laborista presejo, Plzeň.